# NSiR - Nova Sento in Rete
# N. 1163 (9/2023)

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet http://www.esperanto.it
Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet http://iej.esperanto.it
Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"
NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR
I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.
Le lettere non firmate non saranno pubblicate.
Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.
**ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA**
http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm
**LIBRERIA**
http://www.esperanto.it/libri.htm
feilibri@esperanto.it
**INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA**
Il Congresso Nazionale: http://kongreso.esperanto.it
Il Festival Giovanile di Pasqua: http://iej.esperanto.it/ijf
**BIBLIOTECA DI MASSA**
https://reprobi.erasmo.it

Indice articoli

Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Virino 2
Seminario por volontuloj por UK ........ 3
Fervojista kunveno ........ 3
La FEI si rinnova ........ 3
La Dua Bulteno! ........ 5
DAPO TO CFM ASAP ........ 5
UEA kongresos en Aruŝo ........ 6
Nova sidejo en Breŝo ........ 6
Conferenza a Firenze ........ 7

## MESAĜO DE UEA OKAZE DE LA INTERNACIA VIRINA TAGO, 8 MARTO 2023

[ Mesaĝo sendita al UN. Kun afabla peto republikigi ĝin en viaj lokaj kaj landaj gazetoj kaj aperigi ĝin en viaj aliaj komunikiloj. La versiojn anglan kaj francan de la mesaĝo bonvolu trovi en esperantoporun.org/eo/eventoj-kaj-anoncoj/. Dankon! ]

Okaze de la Internacia Virina Tago 2023, Universala Esperanto-Asocio salutas virinojn ĉie en la mondo. Ni daŭrigos kaj intensigos nian laboron por virinaj rajtoj kaj por plibonigo de la situacio de virinoj kaj knabinoj tra la mondo, kunlabore kun aliaj civilsociaj organizoj.

Jam de la jaro 1946, la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN starigis la Komisionon pri la Statuso de Virinoj, kiu celas sekvi kaj dokumenti la staton de virinaj rajtoj tutmonde. UN ankaŭ starigis la organizon UN-Virinoj, kiu laboras por genra egaleco kaj plenpovigo de virinoj.

Genra egaleco kaj plena partopreno de virinoj en ĉiuj sferoj de la vivo estas esencaj. Ni devas antaŭenigi tiun egalecon ĉie. La ĉi-jara temo de la observo-tago -- Novigo kaj teknologio por genra egaleco -- atentigas pri efikoj de la "cifereca divido" sur ekonomiaj kaj sociaj malegalecoj. Virinoj kaj knabinoj povu sekure kaj libere aliri ciferecajn spacojn por plena disvolviĝo kaj socia partoprenado. Perforto per Interreto ja estas perforto, kaj netolerebla.

Ni atentigas pri la fakto, ke por atingi pli inkluzivan interreton, ni bezonas pli lingve diversan interreton. Tiu vasta kvanto de scioj estos utila nur se homoj povas kompreni ĝin. Inkluziveco gravas por faciligi ĉiuspecajn rilatojn inter homoj, celante evoluigon kaj solidarecon inter popoloj malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo.

La Internacia Lingvo, per sia tutmonda reto de Esperanto-parolantoj, donas okazon por vere internacia komunikado kaj komparado pri la situacio de virinoj ĉie en la mondo. Ni aparte estimas tiujn kiuj uzas Esperanton kiel voĉon de tutmonda civila socio.

Krome, por plena inkluzivigo de virinoj, necesas lingva justeco, tiel ke virinoj:

- **egale partoprenu en socio**
- **rolu en gvidaj pozicioj en ĉiuj sferoj kaj medioj**
- **ĝuu socian sekurecon, decan laboron kaj ekonomian liberecon**
- **havu plenan kaj egalecan aliron al edukado**
- **estu liberaj el ĉiu perforto, kaj**
- **povu helpi en la kreado de pli bona mondo por ĉiuj.**

## SEMINARIO POR VOLONTULOJ POR UK

La UK rapide alproksimiĝas kaj estas tempo pensi pri alia renkontiĝo por pli spertiĝi, decidi la taskojn ktp.
Ni pensis ĝin okazigi de la 22a ĝis la 25 de aprilo, ĉiam samstile. Senpaga restado ĉe esperantistoj (ĝis kiam estas litoj kaj se vi tion ŝatas) aŭ page en hotelo. Manĝoj de la 22a vespere ĝis la 24a vespere pagataj de la kongreso.
Partneroj, akompanantoj kompreneble devas pagi.

## FERVOJISTA KUNVENO

Universitato Pardubice, Fakultato de Transporta Inĝenierio
kaj Ĉeĥa Fervojista Esperanto Asocio
invitas vin al internacia faka seminario

### EŬROPAJ FERVOJOJ: daŭripova fervojtransporto

**6-a Marto 2023, 14:00 – 16:30 h** (mez-eŭropa tempo, UTC+1)

**Fakultato de Transporta Inĝenierio, Pardubice, Studentská 95, ĉambro DB 01008**

Prelegos fakuloj el Romanio, Germanio, Svislando, Italio kaj Ĉeĥio.
Seminario estas dediĉita por studentoj kaj aliaj interesuloj pri fervojtrafiko en eŭropa konteksto.

Seminario okazas kadre de la 30-a datreveno de ekesto de la Fakultato de Transporta Inĝenierio.
Prelegoj kaj diskutoj estos tradukitaj el esperanto en ĉeĥan lingvon.
Partopreno estas ebla ankaŭ pere de platformo MS TEAMS, klaku ĉi tie.

Por aliaj informoj kontaktigu fakan garanton de Seminario: jaroslav.matuska@upce.cz.

## LA FEI SI RINNOVA

La Federazione si rinnova ed i promotori desiderano raccontare a tutti voi il funzionamento della "nuova" FEI, ascoltare le vostre necessità, aiutarvi ad aiutarli.
Per questo l'evento mensile in ZOOM di marzo sarà martedì 14 marzo alle ore 21.00, in italiano, e - coordinati dal Presidente Luigi Fraccaroli - interverranno
-Debora Rossetti per il funzionamento di tutta la macchina organizzativa, la segreteria
-Norberto Saletti il nuovo redattore della rivista
-Laura Brazzabeni sui corsi

-Valerio Ceffa sull'informazione al mondo non esperantista.
Non mancate, abbiamo bisogno dell'apporto di tutti.

Seguirà link per il collegamento: intanto segnate in agenda MARTEDI 14 MARZO h. 21.00.

**LA DUA BULTENO!**



## DAPO TO CFM ASAP SEG 03 CMA PLS STP TKS EM

Ne, ne temas pri ekstertera lingvo, pri sekreta kodo, aŭ simila strangaĵo. Tiu linio estas ja en kodo, kiun via redaktoro perfekte regas, nomata "A4A IATA Reservations Interline Message Procedures", aŭ simple AIRIMP. Temas pri komuniksistemo, bazita sur la angla lingvo (kiu, cetere, NE estas la OFICIALA lingvo de flugtransportado – oficiala lingvo kiu ne ekzistas), por interŝanĝi agojn kaj informojn inter vojaĝagentejoj, rezervoficejoj de flugkompanioj, ktp, kiel en la suba ekzemplo. La unuopaj kodoj estas mallongigoj de pli longaj frazoj, kaj la neceso pro tio estis la alta kosto de la teleksoj.



```
--- TST ---
RP/YYZ1A0980/YYZ1A0980            MF/SU  31MAY12/1336Z   7SVDTG
YYZ1A0980/0008MF/31MAY12
RF POST TICKETING FILE FINISHING
  1.SNOW/MARK MR
  2  KL 682 T 18OCT 4 YVRAMS HK1   400P1020A 19OCT  E  KL/7SVDTG
  3  KL 681 Q 26OCT 5 AMSYVR HK1   100P 140P 26OCT  E  KL/7SVDTG
  4 MIS 1A HK1 YYZ 26OCT-SERVICE FEE
  5 AP YYZ 647 260-4200 - AMADEUS HELP DESK - A
  6 TK OK31MAY/YYZ1A0980
  7 RM *MS/V12345/PC14/A40.00/TXRC5.20/C0.00
  8 RM *MSX/FSCHEQUE
  9 RIS 40.00-SERVICE FEE
 10 RIS 5.20-GST/HST TAX FOR SERVICE FEE
 11 RIS -45.20-SERVICE FEE PAID
 12 RIU CHEQUE
 13 FE PAX NON REF/APEX/S2-3
 14 FP CCVI4444333322221111/0913
 15 FS 42
 16 FV PAX DL/S2-3
```

La titola frazo, kiun –mi supozas- vi ne komprenis, elkodeblas jene: **D**o **a**ll **po**ssible **to** **c**on**f**ir**m** **a**s **s**oon **a**s **p**ossible **seg**ment 3 **c**om**ma** **pl**ea**s**e **t**han**ks** **e**xclamation **m**ark; nialingve: *faru ĉion eblan por konfirmi kiel eble plej rapide vojaĝlinion 3 (komo) dankon (krisigno)*. Tute klare, ĉu ne?

## FINAL FANTASY

*Final Fantasy*, per chi non lo sapesse, è un videogioco giapponese di enorme successo nel mondo. Ci sono molte versioni in circolazione e hanno fatto pure un film di animazione. La versione XI ha una colonna sonora mista Esperanto / Inglese. A detta di wikipedia: https://it.wikipedia.org/wiki/Final_Fantasy_XI#Colonna_sonora "Il testo del tema d'apertura del gioco è stato scritto in esperanto; la scelta di tale lingua, concepita come facile mezzo di comunicazione tra i diversi popoli, simbolizza il volere di Uematsu di connettere le persone di tutto il mondo attraverso questo (gioco)." Ascoltatela perché è spettacolarmente bella:

Memoro de la Ŝtono
https://www.youtube.com/watch?v=56H1_2vDH6A

## UEA KONGRESOS EN ARUŜO, TANZANIO, EN 2024

Por la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), okazonta en 2024, la Estraro de UEA unuanime elektis Tanzanion kiel kongreslandon. La unuan fojon UK okazos en la kontinento Afriko. La gastiga urbo, Aruŝo, estas internacia turisma destino, sed ne nur: ĝi ankaŭ estas grava diplomatia urbo, la sidejo de la Orient-Afrika Komunumo kaj de la Afrika Kortumo de Afrika Unio.
La regiono de Aruŝo loĝigas pli ol 2 milionojn da homoj. Ĝi troviĝas je la orienta branĉo de la Granda Rift-Valo, sub modera klimato. La grandurbo estas proksima al la Nacia Parko Serengeti, la Konservada Areo Ngorongoro, la Nacia Parko Lago Manyara, la Gorĝo Olduvai, la Nacia Parko Tarangire, la Monto Kilimanĝaro kaj la Monto Meru en la Nacia Parko Aruŝo mem.
La Esperanto Asocio de Tanzanio (EATA) invitis kongresi en Aruŝo post multjara laboro de la Afrika Komisiono de UEA, kiu plenumis la taskon kunordigi la landajn asociojn en la kontinento por difini la invitanton de la unua UK en Afriko. La kunlaboro estis multhoma kaj internacia. Per tiu decido ankaŭ la Estraro de UEA plenumas devon de la Asocio, kiu en la pasinta jardeko deklaris la okazigon de UK en Afriko kiel strategian elementon por UEA.
La Asocio nun kunlaboros kun la lokaj aktivuloj por fikisi la datojn, lokan kongresan komitaton, temon kaj aliajn detalojn de la 109-a UK. La kongresejo estos la Aruŝa Internacia Kunveneja Centro, altnivela loko por internaciaj eventoj, kiu jam gastigis eventojn de UN. La Kongresa Fako kaj la Estraro de UEA ankaŭ kunlaboros kun ĉiuj partioj koncernataj de la okazigo de la UK, ĉu de la Esperanto-movado, ĉu de lokaj instancoj en Tanzanio. Jam eblas subteni la 109-an UK-on per donaco al la Fondaĵo Afriko de UEA: uea.org/alighoj/donacoj/afriko.
Indas ankaŭ aliĝi al la 108-a UK okazonta en 2023 en Torino, kiu devos kalkuli je speciala partopreno de tanzanianoj: uk.esperanto.net/2023. La nuna favorpreza aliĝperiodo finiĝas en la 31-a de marto 2023.

## NOVA SIDEJO EN BREŜO

Ekde la 2a de marto 2023 Breŝa Esperanto-Grupo havas laborsidejon (*sede operativa*) ĉe la Domo de Asocioj (*Casa delle Associazioni*) en via Cimabue 16, Breŝo, ĉiuĵaŭde de la 19h ĝis la 21h kaj iom plu.

La 9an de marto okazos la oficiala inaŭguro.

## CONFERENZA A FIRENZE

